Gazeto Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

40-a Jarkolekto - Marto 2026 - N-ro 140



Frigiliana

(Malago)

Januaro / Marto 2026

Enhavo

P. 03 Esperanto en Andaluzio.
P. 06 Last-minutaj informoj pri la Andaluzia Kongreso de Esperanto - Malago '26.
P. 08 Novaj oficialaj lingvoj en la UE. La hispana minaco de vetoo.
P. 12 Lingva Angulo: *Las aposiciones.*
P. 16 Poezia Angulo.
P. 17 Nuntempa Vortaro: *Fajr-estingado.*
P. 19 Folioj por Praktikado.
P. 23 Turismi en ... *Frigiliana (Malago)*
P. 27 Notoj pri Esperanto kaj *Andaluzio: La fondiĝo de la unua Esperanto-societo en Ĝibraltaro.*
P. 29 Humuro.
P. 30 E=mc² Scienca Angulo: *La sekreto de nia ĝardeno: plantoj povas komuniki sin.*
P. 32 Flamenko: *24-a Bienalo de Flamenko en Sevilo.*
P. 34 Fervojista angulo: *Ascendo kaj descendo tra la fervoja linio en Despeñaperros..*
P. 36 Komikso: *La Sekretoj de la Ringoj de Saturno.*
P. 44 Libroj en Esperanto lastatempe eldonitaj.
P. 45 Nun Ni. Junulara Paĝo.
P. 47 Ŝako: *La peono, la animo de ŝakludo.*
P. 50 Skolta Mondo.
P. 52 Andaluzia Kuirarto: *Pestinjoj.*
P. 54 Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio: *Mumioj en Alpandeire.*
P. 56 Vorto-ludoj.

Gazeto Andaluzia

Fundada por D. José Garzón Ruiz, en San Fernando (Cádiz) en 1910. Órgano oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto
REDACCIÓN: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86.
ISSN: 1576-0618.

DIRECTOR: Ángel Arquillos López

REDACTORES:
José María Rodríguez Hernández
Alejandro Burgos Escalante

COLABORADORES:
Fabián Jiménez
Carlos Spínola

Sur la kovrilo:

Vidaĵo de strato en Frigiliana (Malago)



ESPERANTO EN ANDALUZIO

Andaluzo en la Universala Kongreso de Esperanto: *La fenomeno "Vélez-Malaga"*

Nia amiko Fabián Jiménez, profesoro pri Historio kaj pri Esperanto en la Mezgrada Lernejo "*Almenara*" de Vélez Málaga, partoprenis en la pasinta Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en la aŭstria urbo Graz. Dum la renkontiĝo, li prelegis pri sia sperto rilate la organizadon de kurso de Esperanto kun oficiala akademia valoro. Temas pri la konata kiel "*Fenomeno Vélez-Málaga"*, kiu ebligis, ke tiu gimnazio estis la unua publika lernejo en Hispanio kiu sukcesis prezenti la internacian lingvon kiel oficialan lerno-fakon.



Fabián Jiménez dum prelego okaze de la Universala Kongreso de Esperanto - Graz (Aŭstrio) 2026.

Fabián klarigis, ke li enkadrigis la projekton ene de la eŭropunia programo *Erasmus+*, tiel Esperanto estis instruata kiel ilo por promocii la interkulturan edukadon, protekti la lingvan diversecon kaj faciligi la lernadon de aliaj idiomoj. Ene de tiu programo, kiu ajn profesoro de publika mezgrada lernejo en Andaluzio rajtas proponi lerno-fakon, se oni priatentas neprajn administraciajn kondiĉojn.

Dum la Universala Kongreso okazinta en Graz (Aŭstrio), Fabián kontaktis kun profesoroj de Francio, Germanio kaj Ĉinio kun la celo stimuli student-interŝanĝojn.



Mezlernejo "Almenara" en Vélez-Málaga (Malago)

Nova faka Esperanto-asocio ĵus naskiĝis en Andaluzio



Kiel vi probable scias, Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kunlaboras en la eldonado de la revuo VENTO, la sola, kiu pritraktas veksilologiajn temojn en Esperanto. Veksilologio estas la scienco kiu studas flagojn.

Nun, la redaktistaro de la revuo organizis internacian renkontiĝon, pere de interreto, por oficiale leĝigi la Veksilologian EsperaNtistan Tutmondan Organizon, tio estas VENTO.

Partoprenis en la renkontiĝo homoj de Hispanio, Portugalio, Italio kaj Francio. Nun, oni ekigis la demarŝojn por registri la asocion ĉe la hispana administracio.

Itala esperantisto, profesoro en Granado



Paolo Coluzzi

Paolo Coluzzi, eksa profesoro pri Sociolingvistiko kaj la Itala Lingvo en universitato de Malajzo, translokiĝis kun sia familio en Granadon. Ĉi tie, li instruas la italan en la Centro pri Modernaj Lingvoj de la Universitato de Granado. Paolo estas aŭtoro de multnombraj artikoloj pri sociolingvistiko, ĉefe pri lingvoj italaj kaj aziaj. Li ankaŭ verkis eseon pri artefaritaj lingvoj, ĝuste pri Klingono kaj Toki Pona.

Li nun planas organizi prelegon pri konstruitaj lingvoj, ĉefe pri Esperanto, en tiu universitata centro.

Komenciĝas nova kurso de Esperanto en la Universitato de Sevilo

Ĉi-jare denove komenciĝas kurso de Esperanto en la Universitato de Sevilo, kun akademia agnosko. Ĝi okazas ĉe la Fakultato pri Turismo kaj Financoj -strato Barrau 17- (klasĉambro 7). La kurso komenciĝis la pasintan 9-an de septembro, ĝi okazas ĉiumerkrede (escepte festo-tagoj) de la 18-a ĝis la 20-a horo.

Ankaŭ ne-universitatanoj povas aliĝi al la kurso, ili nur devas sciigi sian pretecon ĉeesti kaj sekvi la kurson por ricevi la rilatan rajtigilon eniri en la klasĉambron. Pliaj informoj ĉe: info@esperantosevilla.org



Programo de la
22-a la Andaluzia Kongreso de Esperanto
Malago - 2026

Kiel Vi scias, la 22-a Andaluzia Kongreso de Esperanto, kune kun la 4-a NaturAmika Kultur-semajno en Esperanto, okazas en Malago de la 9-a ĝis la 13-a de oktobro 2026. Ni sciigas al ĉiuj legantoj la plej lastajn informojn pri la disvolviĝo de ĉi tiuj renkontiĝoj:

• Ĝis nun aliĝis 42 partoprenantoj el 14 landoj. La kulturaj programeroj okazos en la Dioceza Domo de Malago, kie ankaŭ oni povas resti kaj manĝi. Tamen, laŭ lastaj informoj, ĉambroj en la kongresejo jam estas plene rezervitaj. Do, eblaj novaj aliĝantoj al la kongreso devos aranĝi per si mem la loĝadon.

• La provizora programo estas jena:

Tago	Mateno	Tagmezo / Posttagmezo	Vespero / Nokto
Vendredon 9an	Alveno / Loĝigo Libroservo ekfunkcias 10:30 Malago, la plej gravaj lokoj. Ĉiĉeronas: Juan García del Río	15:00 Bonvenigo 16:00 Prelego: "Verda lingvo por verda Naturo" 18:00 Grupa dinamiko: Vortludo. Gvidas: Jaime.	21:00 Teatro: Sur la fina benko. Dialogo kun gloto-logo. La njorin' de l'malaperinto.
Sabaton 10an	9:00 Eliro al ekskurso al Caminito del Rey	13:00 Fino de la ekskurso. Pikniko kaj promenado. 18:00 Reveno.	21:00 Poezia promenado.
Dimanĉon 11an	9:00 Eliro al Nerja. 10:00 Vizito al Kaverno de Nerja. 12:00 Vizito al Frigiliana.	13:00 Pikniko. Libera Promenado. 16:00 Vizito al urbo Nerja. 18:00 Reveno.	21:00 Flamenka Muzik-ateliero. Gvidas: Ángel.
Lundon 12an	10:00 Prelego de Arno Lagrange. 11:30 Prelego de Carlos Spinola.	16:00 Prelego "Naturaj Rajtoj" de Viviana.	Prelegoj: 17:00 "Esperanta Naturamikaro" de Manuela Blanco 18:00 "Rumanio. Via Transilvanika" de Rodica Todor.

•La Postkongresa ekskurso al Arundo, Setenil de las Bodegas, Tarifa kaj Tanger, ĉi lasta urbo en Maroko, estas nuligita. Kompreneble la ekskursoj al Caminito del Rey, Nerĥo kaj Frigiliana ja okazos.

Las principales tareas de la Asociación Andaluza de Esperanto son:

1) Difundir la lengua internacional Esperanto en Andalucía.

2) Dar a conocer la cultura andaluza en el mundo a través del Esperanto.

¿Quieres ayudarnos a alcanzar estos objetivos?

Si es así, hazte socio de la asociación. La cuota anual es de 20 €, que se pueden abonar en la siguiente cuenta bancaria:

Caixabank IBAN ES74 2100 7234 6713 0048 0698

Tras el pago, por favor informa a la Asociación de tus datos personales en el siguiente correo electrónico: **info@esperanto.ac**

Andaluzia Esperanto - Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

La ĉefaj taskoj de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas:

1) Disvastigi la internacian lingvon Esperanto en Andaluzio.

2) Diskonigi la andaluzian kulturon en la mondon pere de Esperanto.

Ĉu vi volas helpi nin atingi tiujn celojn?

Se tiel, aliĝu al la asocio. La jara kotizo estas 20 €, abonebla en la jena banko-konto:

Caixabank IBAN ES74 2100 7234 6713 0048 0698

Post la pago, bv. informi al la asocio pri viaj personaj datenoj en la jena retpoŝto: **info@esperanto.ac**

Novaj oficialaj lingvoj en la Eŭropa Unio. La hispana minaco de vetoo.

En la somero de la jaro 2023, la hispana registaro proponis modifi la lingvan eŭropunian reglamenton, kun la celo enirigi kiel oficialajn, la lingvojn katalunan, eŭskan kaj galegan. Tiamaniere, ĉi tiuj kunoficialaj lingvoj en kelkaj hispanaj aŭtonom-komunumoj, estus tute oficialaj en la Eŭropa Unio, je la sama nivelo ol la jam ekzistantaj 24 oficialaj lingvoj. Ĉi tiu propono ŝuldiĝis al la pakto de la socialista kandidato prezidi la hispanan registaron subskribita kun sendependismaj politikaj partioj en Hispanio, ĉefe la kataluna *Junts*, por atingi favoran voĉdonon de tiuj politikaj partioj por formi socialistan registaron post la balotado.

Tamen, tuj post la propono, kelkaj ŝtato-membroj de EU, inter aliaj Germanio kaj Svedio, sciigis siajn dubojn kaj eĉ siajn kontraŭajn opiniojn, rilate la proponon. Laŭ kalkuloj la kosto de ĉi tiuj oficialigoj estus pli ol 130 milionoj da eŭroj jare. Rilate tion, la hispana registaro argumentis, ke la kosto estus financita de Hispanio mem, krome, almenaŭ unuamomente, la oficialigo rilatus nur al tradukado de reglamentoj de la Konsilio kaj de la Parlamento de Eŭropa Unio, tio estas apenaŭ 30% el la juraj aktoj de ĉi tiu institucio.



Hispanio proponis en 2023 la oficialigon de la lingvoj eŭska, kataluna kaj galega en la Eŭropa Unio.

Aliaj kontraŭaj argumentoj klarigas, ke tiu ebla oficialigo provokus samajn petojn de aliaj komunumoj kun minoritataj lingvoj en la Unio. Tiel, parolantoj de la frisa lingvo, uzata en Nederlando kaj en Germanio de pli ol 400.000 homoj povus peti samrajtan oficialigon, ankaŭ la samia komunumo en Nordio, la sardaj lingvanoj en Sardio aŭ la parolantoj de la okcitana lingvo, sude de Francio kaj en Hispanio en la Arana valo.

Pro ĉi tiu unua rifuzo de la hispana peto, la Ministro pri Eksteraj Aferoj lanĉis aŭdacan deklaron, kiu unuavide povus eĉ esti komprenata de la aliaj eŭropuniaj ŝtato-membroj, kiel ĉantaĝo: Hispanio ne akceptos, eĉ vetoos, novajn oficialajn lingvojn kaze de eblaj novaj aliĝoj al Eŭropa Unio, se antaŭ ol tio, la oficialigo de la kataluna, la eŭska kaj la galega ne estas akceptata. ***Ĉu ĉi tiu lingva defio povus sukcesi?***

Unuavide, ŝtato-membroj de UE komprenas, ke ĉi tiu firma postulo ŝuldiĝas al politika bezono de la hispana registaro, kiu naskiĝis pro la apogo de vaskaj kaj katalunaj sendependismaj partioj. Do, okaze de ontaj novaj balotadoj en Hispanio, ĉi tiu dependo povas esti ne-necesa, eĉ ne-okazonta, se la socialisma partio ne venkas post nova balotado, okazonta en novembro 2026. Do, nova registaro en Hispanio povus nuligi tiun vetoon, kaj kompreneble ĉi tio estas sciata de la tuta Eŭropa Unio. Do, la vetoo simple diluiĝus kun la tempo-paso.



José Manuel Albares, ministro pri eksteraj aferoj, Eŭropa Unio kaj kunlaborado de la hispana registaro.


Sed, se la vetoo daŭriĝas en la tempo, ĉu ĝi vere povus provoki nuligon de novaj lingvoj en la Eŭropa Unio? Nu, ni vidu la aferon el la praktika vidpunkto.

Forgesitaj novaj aliĝoj al EU el nordiaj ŝtatoj, post la konstanta rifuzo de Norvegio kaj la ĵusa referendumo en Islando kun rezultato kontraŭa al ebla aliĝo, ĉi tiuj du lingvoj: la norvega kun pli ol 5 milionoj da parolantoj kaj la islanda kun apenaŭ 400.000 ne troviĝas inter eblaj venontaj oficialaj lingvoj de EU.

La ŝtato-kandidato kun pliaj ebloj aliĝi baldaŭ al Eŭropa Unio estas Montenegro, kies oficiala lingvo, kvankam nomita montenegra, el la gramatika vidpunkto temas pri la sama lingvo ol la kroata, kiu ja estas oficiala ene de la UE post la aliĝo de Kroatio, do tiu nova ebla aliĝo ankaŭ ne oficialigus reale plian lingvon.

Alia ŝtato kiu prezentis sian kandidatecon, en 2022, estis Moldavio, tamen tucerte tiu aliĝo ne okazos baldaŭ, almenaŭ antaŭ 2030, krome la oficiala lingvo de Moldavio estas la rumana, kiu jam estas oficiala ĉe la UE. Aliaj ŝtatoj kiel Bosnio kaj Hercegovino, Norda Makedonio, Georgio, Serbio kaj aliaj, videblas siajn aliĝojn al UE, kiel eble nur post unu jardeko.

Do, almenaŭ el praktika vido-punkto novaj baldaŭaj aliĝoj al UE ne pliigus la nombron da oficialaj lingvoj, tiel ebla hispana ĉi-senca vetoo estus sen-utila.



Eŭropa Unio

Alia ebla ĉi-rilata demando estas: Ĉu vetooj eblas kaj iam sukcesis sine de la UE? Nu, la principo pri nepra unuanimeco faciligas la prezenton aŭ la minacon de vetooj fare de kelka ŝtato. Konataj estis la vetoo de Grekio kontraŭ la komenco de debatoj kun Norda Makedonio, se ĉi lasta ŝtato ne ŝanĝis sian nomon por eviti konfuzojn kun la historia makedona regiono en Grekio. Ĉi tio solviĝis en la jaro 2018, kiam Makedonio modifis sian nomon per Norda Makedonio.

Historia ankaŭ estis la vetoo de Francio kontraŭ la aliĝo de Britio, ekzistanta inter 1963 kaj 1967, sub la argumento ke la brita ekonomio estis tute ne kongrua kun tiu de la tiama Eŭropa Ekonomia Komunumo. La afero finiĝis kiam en la jaro 1973 fine tiu aliĝo okazis.

Do, vetooj, almenaŭ ĝis nun, preskaŭ ĉiam rilatis al afero plenumenda de ununura ŝtato, kaj ne al agado de la tuta Unio, kiel okazus rilate la oficialigon de tiujn lingvojn. Alie, ĉi tiu kapablo prezenti vetoojn ŝuldiĝas al la unuanima principo, kontraŭ tio kelkaj ŝtato-membroj jam impulsis iniciativojn por nuligi tiun neprigon pri unuanimeco kaj decidi la aferojn pere de kvalifikita majoritato.



En Katalunio disvolviĝis oficiala kampanjo favore al la oficialigo de la kataluna lingvo en la Eŭropa Unio.

Do, eblas demandi, ĉu la vetoo proponita de Hispanio rilate la rifuzon de novaj oficialaj lingvoj se la kataluna, la eŭska kaj la galega ne estas oficialigitaj ĉe EU, estus sukcesa? Tute ne! Unue, pro la fakto, ke oni ne antaŭvidas novajn lingvojn dum la proksimaj jaroj, krome la hispana peto baziĝas sur konkreta politika pozicio de konkreta hispana registaro, kiu plejeble ne ripetos sian politikan majoritaton en la parlamento okaze de la venontaj balotadoj. Krome, Eŭropa Unio komprenis, ke la hispana postulo reale ne ŝuldiĝas al deziro oficialigi lingvojn, sed male al pago de politika kompromiso, kiu restos forgesita post kelkaj jaroj, aŭ eĉ monatoj.

Sed la kerno de ĉi tiu politika duelo inter Hispanio kaj la Eŭropa Unio pro minaco de vetoo, montras, ke la lingvoj, krom komunikiloj, povas esti interŝanĝilo en la internacia politiko, kaj tio povas provoki rifuzojn ne nur al ŝtatoj minacantaj, sed ankaŭ al iliaj lingvoj, fare de la ceteraj ŝtatoj kaj ĝenerale de la enloĝantaro de la EU.

J.M.R.H.



Las aposiciones son estructuras gramaticales que acompañan a un sustantivo al que le añaden información, dándole a la oración una mayor precisión, ayudando a que la comunicación sea más clara. Veamos algunos ejemplos en español:

• *Mi hijo Juan estudia Medicina.*

En este caso "Juan" es una aposición que acompaña a "mi hijo", dando información sobre qué hijo es el que estudia Medicina.

• *La ciudad de Jerez, famosa por sus vinos y por sus caballos, es la ciudad más poblada del sur de Andalucía.*

En este ejemplo la aposición sería "famosa por sus vinos y por sus caballos", en tanto que añade información sobre el sustantivo al que acompaña "Jerez".

En estos dos ejemplos hemos visto que la información añadida gracias a las respectivas aposiciones son diferentes. En el primer caso "Mi hijo Juan", el uso de la aposición es esencial para comprender el mensaje, ya que de no haberse especificado que era "Juan", no habríamos podido comprender qué hijo es el que estudia Medicina.

El segundo ejemplo es distinto. Hemos dicho que la ciudad de Jerez es la más poblada del sur de Andalucía, pero ese mensaje para nada se ve determinado por el hecho que explica la aposición, esto es, que se trata de una ciudad que es famosa por sus vinos y por sus caballos.

Así que podemos decir que hay dos tipos de aposiciones: las especificativas, que afectan directamente al sustantivo al que acompañan, determinándolo con exactitud; y las explicativas, que simplemente aportan una característica de ese sustantivo.

Existen dos clases de aposiciones:

° ***Explicativas: aportan información adicional de un sustantivo.***

° ***Especificativas: aportan información determinante de un sustantivo.***

Estudiemos ahora cada una de estas aposiciones.

- Aposición explicativa: proporciona información adicional sobre el sustantivo al que acompaña, pero no es esencial para identificar a ese sustantivo. Si la eliminamos de la oración, no por ello cambia su sentido. Se suele colocar entre comas. Veamos un ejemplo:

• Picasso, famoso pintor malagueño, también hizo importantes esculturas.

• *Picasso, fama malaga pentristo, ankaŭ faris gravajn skulptaĵojn.*

En el ejemplo vemos que la aposición *"famoso pintor malagueño / fama malaga pentristo",* simplemente ha añadido información sobre quién es *Picasso*, pero realmente no es esencial para decir que "también hizo importantes esculturas".

Veamos cómo sería una aposición explicativa referida no al sujeto, sino al objeto de la oración:

• Visité Málaga, la capital de la Costa del Sol, durante el pasado verano.

• *Mi vizitis Malagon, la ĉefurbon de la Suna Marbordo, dum la pasinta somero.*

Se puede observar que *"Malago"* es el objeto de la oración (es el lugar visitado), por lo que va en acusativo "*Malagon*". La aposición explicativa que acompaña a este sustantivo también va en acusativo:

• *Mi vizitis Malago**n**, la ĉefurbo**n** de la Suna Marbordo, dum la pasinta somero.*

Veamos algunos ejemplo más:

• En el restaurante probamos tempura, una salsa japonesa.

• *En la restoracio ni gustumis tempuron, japanan saŭcon.*

• El pintor presentó sus dibujos, cubistas según su estilo personal.

• *La pentristo prezentis siajn bildojn, kubismajn laŭ sia persona stilo.*

Las aposiciones explicativas van en acusativo si se refieren a un sustantivo previo que también va en acusativo

Mi lernas Esperanton, internacian lingvon.

- Un segundo tipo de aposiciones son los especificativas. En este caso el uso de la aposición es esencial para identificar al sustantivo al que acompaña. No se coloca entre comas. Veamos un ejemplo de una aposicion especificativa determinando a un sustantivo que actúa como sujeto:

• El río Guadalquivir es el más largo de Andalucía.

• *La rivero Gvadalkiviro estas la plej longa en Andaluzio.*

En este ejemplo la aposición especificativa es *"Guadalquivir / Gvadalkiviro"*. Resulta necesaria para identificar al sustantivo, así, gracias a la aposición, conocemos de qué río se trata.

Este tipo de aposiciones especificativas también acompañan a sustantivos cuando estos actúan como objeto directo. Veamos qué ocurre en estos casos:

• Cogí el teléfono y nadie respondió, solo oí la señal de ocupado.

• *Mi prenis la telefonon kaj neniu respondis, mi nur aŭdis la signalon okupata.*

Encontramos una aposición especificativa en esta frase. Se trata de *"signalon okupata"*. Así, hablamos de una señal, pero es la aposición explicativa la que indica de qué señal se trata, de la señal de "ocupado". Pero vemos que *"okupata"*, aunque acompaña a *"signalon"*, no va en acusativo.



Mi nur aŭdis la signalon okupata.

Entonces puede afirmarse que las aposiciones especificativas que acompañan a un sustantivo en acusativo, porque actúa como objeto directo, NO van en acusativo.

Veamos otro ejemplo:

- El año pasado visité la ciudad de Cádiz.
- *La pasintan jaron mi vizitis la urbon Kadizo.*

En este ejemplo la aposición especificativa es *"Cádiz / Kadizo"*, que se refiere al sustantivo *"ciudad / urbon"*.

Las aposiciones si son explicativas NO van en acusativo si se refieren a un sustantivo previo que sí va en acusativo.

Mi vizitas la urbon Kadizo.

En relación al ejemplo anterior, el caso sería distinto si indicamos directamente que visitamos *"Cádiz / Kadizo"*, es decir, omitimos que es una ciudad. Así:

- El año pasado visité Cádiz.
- *La pasintan jaron mi vizitis Kadizon.*

Para terminar el tema del uso del acusativo en las aposiciones, vamos a ver qué ocurre cuando una aposición se refiere a un sustantivo + aposición. Vamos a explicarlo mejor con ejemplos:

- Yo visité Cádiz, ciudad encantadora y bellísima.
- *Mi vizitis Kadizon, urbon ĉarman kaj belegan.*

Como ya hemos visto anteriormente, si nos encontramos una aposición explicativa, como la del ejemplo anterior, esta irá en acusativo si el sustantivo al que acompaña va en acusativo.

- Yo visité la ciudad de Cádiz, ciudad encantadora y bellísima.
- *Mi vizitis la urbon Kadizo, urbo ĉarma kaj belega.*

Si la aposición explicativa acompaña a un sustantivo que se ve determinado por una aposición especificativa "urbon Kadizo", entonces la nueva aposición explicativa no va en acusativo, siguiendo al sustantivo al que acompaña.



- *Vizitu Kadizon, trimiljaran urbon !*
- *Vizitu la urbon Kadizo trimiljara urbo!*



Fernando Herrera
Sevilo, 1539 - 1597

Ruĝ-flava sun', brilanta kiel flamo,
vi purpurigas la ĉielon;
ĉu trovis vi sur ter' pli grandan belon
similan al la Lum' de mia damo?

Tenera Aŭro, milda kiel amo,
Freŝdona flug' havanta kiel celon
nin luli, kiam kovras mian helon
mallum' , ĉu haroj vekis pli da famo?

Luno, honoro nota, moŝta ĥoro
da fajroj supre vagirantaj rave,
ĉu vi vin sentis inter tiuj Steloj?

Purega Aŭro, Suno, flam' el oro
Ĉu vi aŭskultis miajn plendojn prave
Kaj vidis Lumon kun pli da krueloj?

Fernando de Herrera


Tradukis: Antonio Marco Botella

Jen unu el la plej konataj poemoj de Fernando Herrera, la ĉefa reprezentanto de la Sevila Baroka Skolo. Sur lia tuta verkaro estas eble vidi stilon kun itala influo, plibeligita per abundaj retorikaj figuroj.

Ĉi tiu poemo *"Ruĝ-flava sun'"* estas inspirita de lia muzo, Leonor de Milán, Grafino de Gelves, kvankam por kaŝi ŝian nomon, la poeto nomas ŝin: *"Lumo"*.

Fajr-estingado

Fajro-estingisto



Fajro-brigadejo





Ekzerca turo

Avert-lumilo



Fajrestingista kamiono





Ambulanco



Cisterno-kamiono



Kasko





Izolanta
ŝirm-vesto



Sav-ŝnuro



Eskalo



Kamiono kun
teleskopa skalo



Akvo-hoso



Hakilo



Gas-masko

Filtrilo



Fajr-estingilo aŭ

Estingatoro




Portebla lum-ĵetilo



Subternivela hidranto

Rulebla
hos-tamburo





Salto-tuko



Akvo-kanono



Folioj por praktikado

Salamandroj kaj fajro

Ewa Caban (Pollando)

Ĉu vi konas salamandrojn? Ili estas malgrandaj bestoj kun longaj korpo kaj vosto kaj **senhara** haŭto, kiuj apartenas al klaso amfibioj.

Ofta speco de salamandro en Eŭropo estas la **fajro-salamandro**, kiu vivas en **arbaroj**. **Oni povas** renkonti fajro-salamandrojn en montaraj regionoj, proksime al riveretoj. Ili estas bestoj aktivaj ĉefe **dum la nokto. Dumtage** ili restas kaŝe en ombraj lokoj: sub ŝtonoj aŭ en arbo-trunkoj. Tamen povas okazi, ke dum pluvo ili forlasas siajn kaŝejojn.

Salamandroj estas tre belaj. Iuj havas nigran haŭton kun flavaj aŭ oranĝ-koloraj makuloj. La koloroj sendas mesaĝon al malamikoj de salamandroj: **“Ne manĝu min**, mi estas venena”. Efektive, se salamandro estas atakata, ĝi defendas sin kovrante sian haŭton per veneno.

En la **pasinteco**, homoj opiniis, ke la flavaj makuloj sur la haŭto de salamandro **similas al** fajro. En diversaj regionoj de Eŭropo, oni kredis, ke salamandroj naskiĝas kaj vivas en fajro. Kial? Ni imagu preparadon de fajro. Por fari ĝin oni portas arbo-trunkojn el arbaro. Povas okazi, ke interne, inter branĉoj aŭ en truoj, estas kaŝitaj salamandroj, kiujn la homoj ne rimarkis. Kiam **ekbrulas** la lignaĵoj, salamandroj rapidege **elkuras por savi sin**. Al observantoj tio povus aspekti, **kvazaŭ la bestoj subite ekestus en fajro**.

> senhara

Recordemos que en esperanto los adjetivos terminan en "a", así que ya sabemos que nos encontramos con un adjetivo. Nada más ver que esta palabra comienza por "sen" (sin) ya comprendemos que se trata de una palabra compuesta, que da la idea de "sin + algo". Es decir, nos encontramos con un adjetivo que indica que falta algo. El resto de la información la aporta la raíz "har-" (pelo). De este modo, podemos traducirla como "sin pelo". Veamos algunos ejemplos con esta estructura:

- *Ranoj esta senharaj bestoj.* Las ranas son unos animales sin pelo.
- *Li estas senkuraĝa homo.* Él es un hombre sin valor (cobarde).

> fajro-salamandro.

En esperanto podemos unir palabras de varias maneras. Una de ellas es conservando las dos su terminación, en este caso de sustantivo "o" y colocando entre ellos un guion "-".

Hay que recordar que la palabra que más se relaciona con lo expresado va siempre al final. El ejemplo *"fajro-salamandro"*, puede traducirse como *"salamandra de fuego"*. ¿Por qué va *salamandro* al final y no al principio? Bien, porque esta palabra se refiere a un tipo de salamandra, no a un tipo de fuego. Por eso salamandra, que es a lo que al fin y al cabo se refieren estos dos sustantivos unidos, va al final. Si hubiéramos dicho *"salamandro-fajro"*, entonces estaríamos hablando de un tipo especial de fuego, quizá de un fuego con forma de salamandra. Pero no es este el caso.

> arbaroj

Recordemos el sufijo *"ar-"*, cuyo significado es "reunión, conjunto de algo". En este caso *"arbaroj"* significaría "conjuntos de árboles", es decir: "bosques". Veamos algunos ejemplos más con este sufijo:

- *Adresaro*: directorio, conjunto de direcciones.
- *Vortaro*: diccionario, conjunto de palabras.
- *Estraro*: directiva, conjunto de jefes.

> Oni povas

Ya conocemos los pronombres personales: *mi-vi-li-ŝi-ĝi-ni-vi-ili*. Pues bien, existe otro que es el impersonal *"oni"*. En esta frase, el sujeto no soy yo (*mi*), ni tú (*vi*), ni él (*li*), es el impersonal "se". Así que "*oni povas*" se puede traducir como "se puede". Veamos algunos ejemplos de oni:

- *Oni diras, ke la venonta libro de tiu aŭtoro aperos baldaŭ.*
  Se dice que el próximo libro de ese autor aparecerá pronto.
- *Mezepoke oni pensis, ke la Tero estis plata.*
  En la Edad Media se pensaba que la Tierra era plana.

> dum la nokto. Dumtage

La traducción de "dum la nokto" es literalmente "durante la noche". Sin embargo hay otra manera de expresar una idea semejante utilizando el adverbio. Recordemos que en esperanto los adverbios terminan en *"-e"*. Para ello siemplemente unimos la preposición "*dum*" con la raíz y lo convertimos en

adverbio añadiéndole la "*-e*" final. De este modo, podemos decir "*dum la nokto*" o simplemente "*dumnokte*". Veamos algunos ejemplos:

- *Dum la somero mi ferios en la Suna Marbordo.*
  Dumsomere mi ferios en la Suna Marbordo.
  Durante el verano pasaré las vacaciones en la Costa del Sol.
- *Dum la vespero mi kutime promenadas ĉirkaŭ la parko.*
  Dumvespere mi kutime promenadas ĉirkaŭ la parko.
  Durante la tarde habitualmente paseo alrededor del parque.

> Ne manĝu min !

En esperanto el modo imperativo se indica con la "*-u*" final de los verbos. *Ne manĝu min*, se traduce como "No me comas". Veamos más ejemplos del imperativo:

- *Ne kuru antaŭ hundoj.*
  No corras delante de los perros.
- *Ne timu, mi estas apud vi.*
  No temas, yo estoy junto a ti.
- *Studu multe, se vi deziras sukcesi.*
  Estudia mucho, si deseas tener éxito.

> pasinteco.

El sufijo "*-eco*" convierte la raíz en una idea abstracta. En este ejemplo "*pasinteco*" se traduce como "el pasado". Más ejemplos con el sufijo "*-eco*" serían:

- *La boneco de lia konduto estos premiata.*
  La bondad de su conducta será premiada.
- *Elstariĝis la blankeco de ŝia ĉemizo.*
  Se destacaba la blancura de su camisa.

> similas al

Se traduce por "es similar a". Es una expresión muy habitual en el lenguaje oral. Veamos más ejemplos:

• *Oni diras, ke Esperanto similas al la hispana kaj la itala lingvoj.*
Se dice que el Espearnto es similar a las lenguas española e italiana.

• *La meksikaj piramidoj similas al tiuj konstruitaj en Egiptio.*
Las pirámides mexicanas son similares a las construidas en Egipto

> ekbrulas

El prefijo "*ek-*" da la idea de que el verbo al que acompaña comienza a ejecutarse. Si se trata del verbo "*bruli*" (arder) como en el ejemplo de la frase, su traducción sería "comienza a arder" *ekbrulas.*

Veamos algunos ejemplos más:

• *La akvo ekbolos post kelkaj minutoj.*
El agua empezará a hervir después de algunos minutos.

• *La aviadilo ekflugis je akurata horo.*
El avión despegó (empezó a volar) a una hora puntual.

• *Je kioma horo vi eklaboras?*
¿A qué hora comienzas a trabajar?

> elkuras por savi sin.

La preposición *"el"* expresa la idea de que algo se dirige de dentro a fuera. Así que el verbo *"elkuri"* significa "salir corriendo -*kuri*- hacia afuera, huir hacia afuera". En el ejemplo *"salamandroj elkuras por savi sin"* se traduce como "las salamandras corren hacia afuera para salvarse".

> kvazaŭ la bestoj subite ekestus en fajro.

El adverbio "*kvazaŭ*" se traduce por "como si". La traducción de esta frase sería "como si los animales de súbito aparecieran en el fuego". Veamos más ejemplos con kvazaŭ:

• *Kiam li diris tiujn vortojn, mi sentis kvazaŭ baton sur mian ventron.*
Cuando dijo esas palabras sentí como un golpe en mi vientre.

• *Li parolis kaj liaj lastaj frazoj sonis kvazaŭ adiaŭo.*
Él habló y sus últimas frases sonaron como una despedida.

Kvazaŭ no debe confundirse con el español "casi", que se traduce como *preskaŭ.*



Ĉe la orienta regiono de la provinco Malago, interne de belega natura parko, stariĝas 300 metrojn super la marnivelo, la vilaĝo Frigiliana. Pendumita sur deklivo de monto, el ĉi tiu loko eblas vidi imponajn vidaĵojn al Mediterareno kaj al la ĉirkaŭanta valo. Ĝi estas konsiderata, kiel unu el la plej belaj vilaĝoj en Andaluzio, ĉefe pro sia kvieteco ene de montara medio.

Ĉirkaŭ la nuntempa Frigiliana setlejis homoj de antaŭ 3000 jaroj, tion pruvas restaĵoj trovitaj ene de kavernoj.



Blazono de Frigiliana

Dum la 8-a jarcento a.K. venis fenicoj, ekzistas restaĵoj pri tiuepoka nekropolo kaj eĉ aperis kelkaj moneroj romiaj kaj fenicaj. Verŝajne, romiano donis sian nomon al loko, tiel, ŝajnas ke la nomo *Frigiliana* devenas de romiano nomita *Frexinius*. Romianoj restis ĉi tie ĝis la 5-a jarcento p.K., tiam vandaloj detruis malgrandan militan fortreson tie ekzistantan.

Komence de la 8-a jarcento alvenis la araboj, islamanoj ŝanĝis la irigacian sistemon en la zono, ili ankaŭ enirigis novajn kultivojn kiel horto-produktojn kaj sukerkanon. Fine de la 9-a jarcento oni konstruis araban kastelon. Konkerita dum la 15-a jarcento de la kastilia reĝo, la moriskoj, iamaj islamanoj, ribeliĝis kontraŭ kastilianoj meze de la 16-a jarcento. La sufokado de tiu ribelo provokis la detruon de la araba fortreso kaj poste la forpelon de la islamaj enloĝantoj. La tuta zono estis repopoligita de granadanoj kaj valencianoj.

Fine de la 16-a jarcento la nobela familio Manrique de Lara starigis grandan domon dank'al la konstrumaterialoj de la iama araba kastelo. Ĉi tiu konstruaĵo poste fariĝus la unua

fabriko produktanta suker-kanon en Eŭropo. En la jaro 1640 la reĝo Filipo la 4-a koncedis al Frigiliano la kategorion vilao, do ĝi fariĝis propra municipo kun 160 enloĝantoj. Kelkajn jarojn poste oni konstruis kristanan preĝejon. La ekonomia vivo de la vilaĝo en tiu tempo baziĝis sur la produktado de suker-kano.

La napoleona invado de Hispanio estis terura en Frigiliana. Post la morto de kelkaj francaj soldatoj, venĝeme kelkaj homoj de la vilaĝo estis pendumitaj de la invadantoj. Tiu loko ankoraŭ hodiaŭ estas konata kiel *"la horca"*, (la pendumigilo). Dum la tuta 19-a jarcento la suker-kana industrio enriĉigis la zonon, aperis ankaŭ miel-kolektantoj kaj farun-muelejoj.

La 20-a jarcento komenciĝis en Frigiliana kun laboristaj problemoj. Pro sinsekvaj tertremoj, la kamparanoj suferis ne-kalkuleblajn damaĝojn. Dum la sekvantaj jaroj la terkulturado tute renoviĝis, novaj fruktoj estis kultivataj, ĉefe tropikaj, kiel avokadoj kaj mangoj.

Tamen, la plej grava ekonomia rimedo de la urbo estas la turismo. Centoj da eksterlandanoj, ĉefe germanoj kaj britoj ekloĝis en la urbo, kiu fariĝis unu el la plej belaj en Andaluzio. Nuntempe Frigiliana estas vilaĝo kun 3000 enloĝantoj, ĝi estas vizitenda loko okaze de vojaĝo tra la Suna Marbordo.

Monumentoj

La *Ingenio*

Starigita unuamomente kiel palaco de nobela familio, poste ĝi fariĝis fabriko produktanta sukerkanan mielon, la sola en Eŭropo ĝis nun funkcianta. Temas pri konstruaĵo de



pli ol 2000 m^2 , ene de ĝi troviĝas kune palacaj ĉambroj kaj industriaj zonoj. La fasado montras renesancajn elementojn, videblas du niĉoj kun bildoj de Sankta Rajmondo kaj la Virgulino de Karmelo, ankaŭ aperas du sun-horloĝoj.

La fabrikado dependis de kompleksa reto de kanaloj. La akvo malsupreniris per akvo-konduktiloj de apuda monteto. La hidraŭlika falo movis la maŝinaron kaj la muelilojn. Interne de la konstruaĵo troviĝas antikvaj salonoj, galerio kaj kapelo, apud areoj por produkti sukerkanon, kun ties maŝinaro kaj basenoj.

Olda Akvo-fontano

Temas pri akvo-fontano de la 17-a jarcento, konstruita dum la regado de Íñigo Manrique de Lara, kvina senjoro de Frigiliana, kies blazono aperas sur ĝi. Utilis kiel akvujo por la enloĝantaro kaj por besto-trinkejo.



Domo *El Apero*

Starigita komence de la 17-a jarcento, utilis unue kiel grenejo kaj laboral-tenejo. Post rekonstruo antaŭ 30 jaroj, ĝi fariĝis Kultura Centro, tie troviĝas la Municipa Biblioteko, la Arkeologia Muzeo kaj Turism-oficejo.

Reĝa silo

Antikva silo konstruita en la 17-a jarcento, tie oni konservis grenon por esti disdonita en tiuj jaroj, kiam la rikolto ne estis tre abunda. Nuntempe, la loko utilas por privataj loĝejoj, nur estas videblaj kelkaj arkoj el briko en la fasado, tamen ĝi estas unu el la plej belaj kaj fotografiitaj anguloj en la vilaĝo.



Preĝejo Sankta Antono

Starigita fine de la 17-a jarcento kaj reformita unu jarcenton poste. Temas pri renesanca konstruaĵo kun formo de latina kruco kaj tri navoj. Supozeble sur tiu loko ekzistis antaŭe islama moskeo. Apud la fasado stariĝas sonoril-turo kun horloĝo.

Festoj

Festo de la Suker-kana mielo

Kiel dirite, en Frigiliana funkcias ekde la Mezepoko la sola fabriko

en Eŭropo produktanta suker-kanan mielon, aŭ melason. Fine de la monato aprilo okazas festo, kie ĉio rilatas al tiu natura produkto. Tuttaga festo kiam estas eble gustumi pladojn, kies ĉefa ingredienco estas la melaso. Ankaŭ okazas liberaj vizitoj al la fabriko.

Festo de la Tri Kulturoj

Dum la lasta semajn-fino de la monato aŭgusto okazas festo por omaĝi la tri ĉefajn kulturojn de Frigiliana dum ties historio, tio estas la kristana, la islama kaj la juda. La stratoj pleniĝas je muzikaj kaj teatraj spektakloj, kie la kunfratiĝo inter tiuj kulturoj estas la ĉefa rolulo. Proksimume 20.000 vizitantoj alvenas en la urbon por ĝui tiun specialan etoson.

Gastronomio

La gastronomio de Frigiliano estas simila al tiu de la ceteraj vilaĝoj de la malaga regiono Aksarkio (hispane: *Axarquía*). Naturaj produktoj kiel la oliv-oleo, suker-kano, ĝarden-legomoj kaj muskat-vino estas la ĉefa ingrediencoj.

Tre konataj estas la kapridaĵo kun ajlo kaj migdaloj. Oni povas gustumi ankaŭ grandan diversecon da legomaj kuiraĵoj, ekzemple tiuj kun brasikoj, aŭ fenkoloj kun gado.

Rilate dolĉaĵojn la kuirita mielo kaj la *marcochas* estas tre tipaj, ambaŭ ellaboritaj pere de suker-kana mielo. Elstarindas ankaŭ la batato kun melaso.



La fondiĝo de la unua Esperanto-societo en Ĝibraltaro

La historio de la organizita Esperanto-movado en Ĝibraltaro, brita kolonio sude de Andaluzio, komenciĝis la 7-an de marto de 1907. Tiutage okazis renkontiĝo de homoj kiuj parolis aŭ interesiĝis pri la Zamenhofa lingvo. Ĝi okazis en la tiama sidejo de la Borso kaj Merkantila Biblioteko de la kolonio, nuntempe tie troviĝas la Parlamento de Ĝibraltaro.



Tiama sidejo de la Borso de Ĝibraltaro kaj Merkantila Biblioteko, loko kie fondiĝis la *Gibraltar Esperantist Society.*
Post la jaro 2006 ĝi estas la Parlamento de la kolonio.

Prezidis la kunveno S-ro Henry Pipon Schooles. Li parolis pri la celo de la kunveno kaj poste pri la utileco de la internacia lingvo Esperanto. Sir Henry Pipon estis brita advokato, li naskiĝis en Malto en la jaro 1849, kaj ekde la jaro 1905 li estis prezidanto de la ĉef-tribunalo de Ĝibraltaro, antaŭe li estis prokuroro en Jamajko, Belizo kaj Grenado, tiam ankaŭ britaj kolonioj.

Aliaj homoj parolis poste, inter ili eĉ la direktoro de la ĵurnalo *Gibraltar Chronicle*. Intervenis ankaŭ dum la kunveno Charles J. Edwards, sendube la plej konata esperantisto en la urbo. Edwards laboris en la brita administracio de la kolonio kaj li estus poste multjara reprezentanto de UEA kaj de la E-movado en Ĝibraltaro. Li ankaŭ estis la aŭtoro de turisma gvidlibro en esperanto pri la urbo, kiu poste eĉ estus tradukita en la anglan lingvon.


Ĉeestis la renkontiĝon kaj salutis la partoprenantojn S-ro Isidoro Moreno, reprezentanto de la E-movado, tiame nomitaj konsuloj, en la apuda hispana urbo Alheciro.

Alia partoprenanto en la kunveno estis Arturo de Carrara Rivers, kiu, sendube kuraĝigita de la etoso favore al Esperanto proponis krei grupon kun la nomo *The Gibraltar Esperantist Society.* Kiu estis Arturo de Carrara?


Li naskiĝis en Ĝibraltaro en la jaro 1881 en familio ital-devena, kiu fondis komercan firmon en Ĝibraltaro. Arturo daŭrigis la komercajn agadojn de sia familio kaj samtempe li aliĝis al brita armeo en la kolonio. Kiel militisto li luktis dum la Unua Mond-Milito en la flandra regiono.

Post la milito, en 1920, li estis nomumita brita konsulo en Tampiko (Meksiko). Kiam li forlasis tiun diplomatan postenon li loĝis en kelkaj britaj kolonioj. Li retiriĝis en Jamajko.

Ĉu tiu unua kunveno de la esperantistaro en Ĝibraltaro sukcesis? Sendube jes! Post la propono lanĉita de Arturo de Carrara ĉirkaŭ 120 homoj aliĝis al tiu societo. La prestiĝa libro-vendejo *Beauland,* ĉe la ĉefa strato de la kolonio, fariĝis la sidejo de la Esperanto-societo.




Anglalingva turisma gvidlibro de Ĝibraltaro, tradukita el la originala esperantlingva verko, kies aŭtoro estis Charles J. Edwards.




Jen la libro "Lernu lingvon post 10 Paŝoj". La tutan matenon promenante kaj mi kapablas diri eĉ ne unu frazon..
10 paŝoj


Mi pensas, ke mi eraris, kiam mi aliĝis al kurso pri internacia lingvo.



$E=mc^2$ Scienca Angulo


La sekreto de nia ĝardeno: Plantoj povas komuniki sin

Tradicie, vegetaĵoj estis rigardataj kiel pasivaj estaĵoj. Arboj kaj floroj ĉiam estas senmovaj kaj tute izolitaj, ŝajnas, ke ili okupiĝas nur pri fotosintezado kaj vidi la sezonojn pasi. Tamen, la scienco, dum la lastaj jardekoj, ŝanĝis ĉi tiun perspektivon. Laŭ lastaj eltrovoj, la plantoj posedas nekredeble kompleksan komunik-sistemon. Ili parolas inter si, sendas signalojn, dividas siajn resursojn kun la plej malfortaj kaj eĉ elsendas sonojn kiam ili suferas.

La subtera interreto de la arbaroj

Sub niaj piedoj, tute kaŝita, ekzistas reto de ligoj kiu unuigas preskaŭ ĉiujn plantojn de la planedo. Ne temas pri optikaj kabloj, sed pri mikorizaj fungoj kiuj subtenas perfektan simbiozon kun la radikoj. Ĉi tiu subtera reto ĵus estis nomita de sciencistoj kiel l*a subtera interreto de la plantoj.* Pere de ĉi tiu reto, grundo fariĝas kompleksa interŝanĝa aŭtovojo kie plantoj povas:

- interŝanĝi ĝis trionon de sia karbono, produktita de ili dank'al fotosintezado al la fungoj, kontraŭ esencaj mineraloj kiel nitrogeno kaj fosforo, elprenitaj de la fungoj el la rokoj.



- Sendi sukeron kaj nutraĵojn al pli junaj burĝonoj, kiuj kreskas en la ombro kaj ankoraŭ ne povas fari sufiĉan fotosintezon por pluvivi per si mem.

- Averti se insekta plago atakas arbon. Okaze de atako, la planto sendas kemiajn signalojn tra la funga reto por averti la proksimajn najbarojn, tio ebligas ke ĉi lastaj povas aktivigi siajn ĥemiajn defendojn antaŭ ol la danĝero alvenas.

Se la grundo estas la vojo de fizika komunikado, la aero estas la kanalo por pli rapidaj avertoj. Plantoj uzas organikajn kombinaĵojn por komunikiĝi distance. Tiel, kiam folio estas difektita de plago, ĝi liberigas miksaĵon de ĥemiaj substancoj, kiuj elirigas avertan parfumon forportatan de la vento.

Sed la botanika pristudado iris pli antaŭan paŝon malkovrante, ke plantoj ankaŭ elsendas sonojn. Ekzemple, esploroj per ultrasonaj mikrofonoj montris, ke plantoj kiel tomatoj aŭ tabako elsendas trakojn ĉe frekvencoj kiuj superas la aŭd-kapablon de la homa orelo (inter 20 kaj 100 kilohercoj), kiam ili suferas sekecon aŭ tranĉojn en siaj tigoj. Same, sana planto estas relative silenta, ĝi elsendas apenaŭ paron da sonoj ĉiuhore. Tamen, soifanta aŭ difektita planto povas elsendi dekojn da trakoj ĉiuhore, kiel vera sukur-voko al la ĉirkaŭaĵo. Kvankam plantoj ne havas orelojn, insektoj kaj aliaj proksimaj bestoj povas percepti ĉi tiujn vibrojn aŭ kombinaĵojn, kaj eĉ aliaj najbaraj plantoj interpretas ĉi tiujn akustikajn kaj ĥemiajn ŝanĝojn por prepari sin antaŭ ebla akvo-manko.

Esploristoj asertas, ke la plej fascina afero pri ĉi tiu reto de signaloj estas ke ĝi funkcias sen centra cerbo.

Male al bestoj, kiuj dependas de nerva sistemo por prilabori la informojn, la plantoj distribuas sian *"intelekton"* tra sia tuta korpo. Ĉiu radiko, ĉiu folio kaj ĉiu burĝono agas kiel sensa finaĵo kapabla percepti stimulojn, preni decidojn kaj sendi mesaĝojn.

Kiam planto ricevas avertan signalon pro apudaj bestoj vorantaj najbarajn plantojn, ĝi ne restas silenta. Ĝi komencas produkti tataninojn kaj aliajn toksinojn, kiuj amarigas siajn proprajn foliojn, tiel ili ne estas tre gustumindaj por la ebla manĝanto. Tiamaniere, la frua averto bremsas plagon antaŭ ol ĝi fariĝus arbara epidemio.

Ĉi tiuj esploroj ne nur ŝanĝas nian vidadon pri la biologio, ili komprenigas nin, ke plantoj povas helpi dezajni pli rezistajn kultivaĵojn, kapablajn protekti unu la aliajn per naturaj stimuloj anstataŭ uzi masive ĥemiajn pesticidojn.

UNED

Hasta el 21 de octubre es posible matricularse en el curso de Esperanto (niveles A2, B1 o B2) que organiza la Universidad Nacional de Educación a Distancia.

¡Aprende Esperanto! o, si ya tienes un nivel similar a los propuestos por el curso de la UNED, consigue un título oficial que lo acredite.

Más información:
https://www.uned.es/universidad/inicio/estudios/idiomas.html



Flamenko

24-a Bienalo de Flamenko en Sevilo

La urbo Sevilo denove fariĝas la monda ĉefurbo de la flamenka arto. De la 9-a de septembro ĝis la 3-a de oktobro 2026, la 24-a Flamenka Bienalo de Sevilo 2026 disvolvas sian vastan programon. Tiam stratoj, teatroj kaj monumentoj transformas sin en bolantaj ujoj de kreivo, generacia talento kaj devoteco al la plej antikvaj kaj puraj artistoj. Do, dum ĉi tiuj tri semajnoj, la festivalo pruvas ke la flamenko estas aktuala arto.

La ĉi-jara eldono ekflugis alte pere de la inaŭgura spektaklo titolita *El Mundo por Montera*, tio okazis en la Taŭrludejo de Sevilo. Ĉi tiu granda festo kunigis sur la sama scenejo ĉefajn kaj novajn figurojn de la flamenka arto, kiel José Mercé, José de la Tomasa, Martirio, Arcángel, Rosario La Tremendita kaj la Flamenka Dancgrupo de Andaluzio, sub la gvidado de Patricia Guerrero.

Post tiu inaŭgura spektaklo, la programaro disvolvis pli ol 70 spektaklojn, kiuj serĉas la perfektan ekvilibron inter la plej ortodoksa tradicio kaj la plej avangardaj proponoj.

Dum la Bienalo la plej gravaj artaj centroj de la urbo Sevilo metas sin je la dispono de la Flamenka arto. Ĉe la Teatro Maestranza kaj Lope de Vega okazis la plej gravaj spektakloj. La dancistino Sara Baras ludis "*Infinita*", profunda omaĝo al la fontoj de la danco. Elstarindas ankaŭ la muzika renkonto inter la majstro de la gitaro Rafael Riqueni kaj la usona saksofonisto Tim Ries, eĉ estas necese diri, ke la enir-biletoj por ĉeesti ĉi tiun muzikan spektaklon elĉerpiĝis kelkajn semajnojn antaŭ la premiero.




La dancistino Sara Baras en sia spektaklo "Infinita"

Aliaj lokoj kiel la Preĝejo de Sankta Ludoviko de la Francoj, la Reĝa Alkazaro kaj la Reĝa Artileria Fabrikejo fariĝis intimaj scenejoj kie la koncerta gitaro kaj la libera kanto resonas kun akustiko kaj magio nekompareblaj.

Sed unu el la plej grandaj allogaĵoj de la ĉi-jara bienalo estas la kuraĝa defio pri estetikaj interkruciĝoj. Tiel, kreintoj kiel Olga Pericet, Andrés Marín kaj La Tremendita daŭre strečas limojn de la flamenka ĝenro, dialogante kun aliaj muzikaj stiloj kiel la elektroniko, ĵazo aŭ la klasika muziko sen iam ajn perdi la atenton al la flamenka stilo.

Samtempe, la generacia transdono estas certigita danke al la elstara ĉeesto de junaj sed solidaj promesoj de la flamenka arto, kiel Ángeles Toledano, Juan Tomás de la Molía aŭ de elstaraj partoprenantoj de la Andaluza Rondo de Junaj Flamenkoj.

Do, ne temas nur pri festivalo de grandaj mon-kvantoj, sed pri ekzerco de kultura rezisto kaj reafirmo de identeco, kiu celas montri ke flamenko bonege fartas. Tiel, en Sevilo oni pruvas, ankoraŭfoje, ke Flamenko ne estas nur pasinteco kaj memoro de antikva popolo, sed vivanta, mutaciema kaj profunde nuntempa organismo, kiu pulsas kun neatendita forto.



HISPANA AMIKARO DE FERVOJISTOJ ESPERANTISTAJ

Fervojista Angulo

Ascendo kaj descendo tra la fervoja linio en Despeñaperros

Dum pli ol unu jarcento, trapasi la naturan limon inter Kastilio kaj Andaluzio per trajno ne estis simpla vojaĝo de unu punkto en alian. La plej riskoplena momento okazis kiam la vagonaro descendis tra la deklivo de Despeñaperros. Ĉi tiu loko estas interkrutejo kaj monto-pasejo elfosita de samnoma rivero norde de la provinco Jaeno. La montopasejo havas krutegajn rokomurojn, kun deklivoj pli ol 500 metrojn altajn kaj tre uzataj dum la tuta historio, ĉar temas pri la natura pasejo inter Andaluzio kaj Kastilio. Pro tio, tra Despeñaperros ĉiam pasis komunikvojoj kiel la nacia ŝoseo (A-4) aŭ grava fervoja linio.

La fervoja linio tra Despeñaperros estis dezajnita kaj konstruita fine de la 19-a jarcento, kun la celo konekti Madridon kun la havenoj de Andaluzio. La tiutempaj inĝenieroj trafis titanajn fendojn fositajn de la rivero Despeñaperros, ĉirkaŭitaj de vertikalaj muro el kvarcita roko, profundaj ravinoj kaj kruta orografio.

Por trapasi tiujn deklivojn, la laboristaj taĉmentoj devis vakuigi la monton per pioĉo, ŝovelilo kaj dinamito, starigante metalajn viaduktojn kaj truigante sinsekvon de tuneloj. Tiu enorma laboro transformis la linion en strategian koridoron nepre necesan por la komercado kaj la transporto de pasaĝeroj.



Por supreniri la deklivon, la malnovaj vapor-lokomotivoj, kaj poste la potencaj dizelaj maŝinoj, elpremis siajn vapor-kaldronojn ĝislime inter densaj nuboj de nigra fumo kaj karbo.

Tamen por malsupreniri, la defio estas eĉ pli grava. Kun tre forta deklivo kaj itinero plena de sinsekvaj mallarĝaj kurboj, la trajnoj akumulis danĝeran inercion en malmultaj kilometroj. En la epoko de vapor-lokomotivoj la kontrolo de la vagonaro dependis de la konstanta uzo de kontraŭ-vaporo kaj permana bremsa sistemo de la vagonoj, mekanismo kiu neprigis fizikan forton kaj ŝtalajn nervojn. Mekanika eraro aŭ troa varmiĝo por la kontinua froto povis irigi la trajnon rekte en la abismon.



La fervoja linio tra Despeñaperros havis kelkajn haltejojn kaj kabanojn kie loĝis vojgardistoj kun siaj familioj. Ili ofte salutis per flagoj la ŝoforojn de la lokomotivojn, fervojaj profesiuloj kiuj konis ĉiun centimetron de la itinero.

Kun la adopto de nova fervoja vojo inter Andaluzio kaj Kastilio tra la vilaĝo Brazatortas en la jaro 1992, la altrapidaj trajnoj jam ne trapasas Despeñaperros. Tamen la descendo al Despeñaperros restas viva en la kolektiva memoro de la plej maljunaj homoj en Andaluzio.

HISPANA AMIKARO DE FERVOJISTOJ ESPERANTISTAJ

fervojista@esperanto.ac
https://hafe-19.webself.net



LA SEKRETOJ DE LA RINGOJ DE SATURNO

Ene de spaco-ŝipo cele al planedo Saturno por eltrovi mineralojn, leŭtenanto Harold Stinton observas la ekranon. Li grumblas…









Subite, la interfono eksonis...



Leŭtenanto Stinton kaj lia akompananto, la leŭtenanto Varen Gentri, atente rigardas la ekranon, ili malfermegas siajn okulojn dum la ŝipo evitas kelkajn malgrandajn vagantajn partiklojn.



Malrapide, sed sekure, la spaco-ŝipo eniris en la ringojn de Saturno; la malgrandaj satelitoj estas rondaj kaj glataj pro la konstantaj kolizioj unuj kun la aliaj. La bruego de tiuj kolizioj surdigas la pasaĝerojn de la ŝipo.

Baldaŭ la spaco-ŝipo aperas trans la alia zono de la ringoj kaj ĝi alproksimiĝas al alia ekstera satelito.





Leŭtenantoj Stinton kaj Gentri, post ekipi sin per siaj specialaj roboj, prenis siajn porteblajn ilarojn kaj eniris en la kluzo-pordon.







Gentri kaj Stinton trapasas la kluzo-pordon. Ili troviĝas ĉe la maldekstra flanko de la ŝipo. Tuj, la spaco-ŝipo foriras. Estas tempo eklabori.




Ambaŭ mineralogoj troviĝas sur la surfaco de la satelito. Ili vidas kiel la spaco-ŝipo foriras.



Dum kelkaj horoj Stinton kaj Gentri prenas kelkajn rokojn el la surfaco de la satelito por pristudi ilin.



Ambaŭ leŭtenantoj fosis pli profundan truon, kiam subite…



Ok horojn poste, la spaco-ŝipo revenas super la sateliton, tamen Gentri kaj Stinton ne estas tie.

Eĉ ne unu spuro pri ili, komandanto Kio okazis al ili?

Nur Dio tion scias. Eble alia satelito koliziis kontraŭ ĉi tiun. Tiuj kompatindaj homoj povus esti nun ŝvebantaj en la spaco. Se tiel, ni neniam trovus ilin.

Post kelkaj horoj serĉante…

Kion ni faros, oficiro?

Ni bezonas analizi la rokojn de ĉi tiuj satelitoj. Sen Stinton kaj Gentri, ni ne povos priesplori la rokojn.
Ni povas nur…

… preni unu el ĉi tiuj satelitoj kaj porti ĝin en la Teron.

La satelito kie malaperis Stinton kaj Gentri estos transportata en la Teron. La ŝipo pafis fortan radion kontraŭ ĝin.

Komandanto, ni ĵus kaptis la sateliton pere de nia radio.

Nu, ni revenu hejmen!

La spaco-ŝipo akceliĝis. Post ĝi, vojaĝis la malgranda satelito de Saturno.

Nia reveno en la Teron daŭros pli da tempo pro nia suplementa ŝarĝo.

Kompatindaj Gentri kaj Stinton ! Ili ŝvebas ie ajn en la spaco.

Post unu jaro, la ŝipo kaj ties suplementa ŝarĝo alvenis en la Teron.

Jen la satelito, Generalo! Kontraŭe ni perdis du el niaj plej lertaj homoj. Probable, ili estas nun perditaj en la spaco

Ni perdis dek pliajn homojn en la Luno en similaj cirkonstancoj.

La analizado de la satelito de Saturno komenciĝis tuj. Oni starigis skafaldon por ĉirkaŭigi tiun enorman rokegon. Tiam…

Hej! Venu rapide ĉi tien!

Mia Dio! Ĉi tio estas terura!



La komandanto rekonis la korpojn.



La komandanto observis la zonon signitan de la esploristo.





La komandanto ekfosas pene ĉe la mola surfaco de la satelito. Unu plenŝovelo post alia.



Du junaj soldatoj helpis la komandanton, tamen lia kruro jam sekiĝis… kiel sekra pruno.



La spongeca maso eliris el la truo fosita sur la satelita surfaco kaj malrapide sin trenas ĝis la homoj, kiuj kuras timege. Ili abandonas la komandanton, kiu ne povas kuri. La ruĝa monteto antaŭeniras.



La spongeca nubo etendiĝis rapide tra la tuta satelita surfaco. Mineralogoj observis ĝian evoluon de fora loko.

Temas pri viva organismo.

Same kiel amebo!

Tuj, la monstro rifuĝis ene de roko. Kelkaj fakuloj estas kunvokitaj por decidi kion fari.

Ni devas detrui ĝin!

Ja, sed kiel? Ni ne scias kio ĝi estas!

Unu el la mineralogoj stariĝis.

Mi scias kio ĝi estas. Mi studis bakteriologion kaj dank'al ĉi tiuj konitaĵoj, mi scias, ke mi ne eraras!

Sinjoroj! Ĉi tio ne estas satelito. La sfero estas sporo kaj ene de ĝi troviĝas giganta bakterio.

Ĉu sporo?

Jes, sendube! Tio klarigas la abundon da organika materio kaj la manko de mineraloj!

Ĉu vi volas diri, ke la ringoj de Saturno reale estas sporoj kaj... ene de ĝi bakterioj?

Ĝuste tiel! Kiam bakterioj disvolviĝas en malbonaj kondiĉoj, ili formas terajn krustojn ĉirkaŭ si. Pro tio, ili estas sporoj. Eble tio okazis ĉirkaŭ la planedo Saturno.

Sed, kiel ni povus detrui bakterion aŭ sporon?

Estas tre malfacile detrui sporon! Se ni sukcesas elirigi la bakterion el la sporo, la kutimaj metodoj pri steriligo povus funkcii… ekzemple bolanta akvo aŭ karbonata acido.

Kiel ajn, ni devigos ĝin eliri !

Kiel?

Ni rompos la sporan kovraĵon!

G

Fakuloj ellaboris agad-planon. Sinsekvaj eksplodoj ĉirkaŭ la surfaco de la satelito.

Kiam ĉiuj eksplodos, la spora kovraĵo malfermiĝos.

Dek tri kamionoj plenaj da karbonika acido ĉirkaŭas la sferon.

Ĉio preta!
Ses, kvin, kvar, tri, du, unu…

Kiam la kovraĵo defalos, ili aspergos la monstran bakterion per tiu acido.

Nun!

Bonege!

Post enorma eksplodo…

La malgranda satelito rompiĝis laŭ du duonoj. Ciu duono falis kaj aperis granda bakterio.

Aspergu ĝin!

La spongeca giganto evitas la acido-spruĉojn lanĉitajn kontraŭ ĝi.

La acido ne sufiĉas por mortigi ĝin!!!

Atentu, ĝi atakas unu el la kamionoj! Atentu!

La amebo glutas la kamionon kaj la kompatindajn pasaĝerojn.

Haaaa!!!

Veeee!!!

Poste, la grandega bakterio foriris malrapide ĝis apudan lagon kaj fine ĝi subakviĝis.

Ĝi estas ene de la lago! Kion ni povas fari?

Ni devas serĉi alian metodon. Ni boligu la akvon!

Sed kial ni povas boligi kompletan lagon?

Facile!

Ĉu vi scias kiel funkcias vaporigilo? Nu, sufiĉas plialtigi la salecon de la akvo, kaj poste pasigi elektran kurenton tra ĝi.

Tunoj da salo estis ĵetitaj en la lagon, dum oni transportis gigantan elektran generatoron ĝis la lag-bordon. Du enormaj blokoj el grafito, konektitaj al generatoro estas subakvigitaj en la akvon.

Ĉio funkcias! Ŝaltu la generatoron!

Tuj, la elektra kurento tremigis la lagon, poste la akvo bolis. Enormaj vapor-nuboj ascendis.

Se ĉi tiu metodo ne mortigas ĝin, nenio povos fari tion.

La tuta lago vaporiĝis, tiam, sur la fundo, aperis enorma sfero.

Ĝi kreis novan sporon!

Restas nur ununura solvo Portu ĝin ree en Saturnon.

Ĵus ricevitaj infomoj de la centra kazerno. Oni eltrovis dek kadavrojn en la Luno. Ili estis tute sekaj!

La sciencistoj rigardis sin kun teroro.

Do, nia Luno ankaŭ estas sporo!

Kaj kio okazas kun la satelitoj de aliaj planedoj ĉe nia Suna Sistemo. Ĉu ĉiuj lunoj estas sporoj?

Kaj rilate la planedojn mem? Kiu scias? Verŝajne sub nia ter-krusto dormas gigantaj bakterioj !!!

FINO

Do…ĉu taŭgas fosi petrol-putojn?

Libroj en Esperanto lastatempe eldonitaj



La ĉashundo de la baskerviloj

Unu el la plej famaj rakontoj de la detektivo Ŝerloko Holmso.

224 paĝoj 12'60 €



La edzino de l'tempovojaĝanto

Amhistorio en kiu unu el la amantoj sin movas tra la tempo.

653 paĝoj 22'50 €



Rekviemo por hispana kamparano

Memoroj de pastro antaŭ rekviemo por junulo murdita tuj antaŭ la Hispana Enlanda Milito.


67 paĝoj 12 €



Ĉapitroj el Romaa Historio

Ilustrita enkonduko en la mirinda, kaj ne sufiĉe konata, historio de la romaoj.

125 paĝoj 7'50 €



Kontraŭ milito. La kuraĝo konstrui pacon.

Papa pledo por paca mondo.

143 paĝoj 18 €



Cindrulino, la Belulino Dormanta kaj aliaj rakontoj.

Kvar perloj de la rakontarto

84 paĝoj 6 €

nun ni

junularaj paĝoj

Andaluzia Junulara Esperanto-Unuiĝo - AJEU

Kiel informite sur la pasinta numero de la revuo, okazis en la Barcelona vilaĝo Tiana la 82-a Internacia Junulara Kongreso (IJK). Jen kelkaj interesaj konitaĵoj kaj fotografiaĵoj pri la renkontiĝo:

Pri la ĉeestantoj, kvankam ankoraŭ ne ekzistas oficiala kalkulo, verŝajne ĉeestis pli ol 300 homoj. La kongreso troviĝis en perfekta loko: malnova monaĥejo en la montaro, en kampara izolo sen aliaj konstruaĵoj, kaj ejo ekskluzive por esperantistoj. Kaj la urbo Barcelono troviĝis nur je duonhoro.



Pri la kultura programo, okazis vigla vespera kaj nokta programo. Oni ĝuis koncertojn de kelkaj muzik-bandoj, inter ili Kaj Tiel Plu, Kimo, Gijom' kaj La Perdita Generacio. Aldoniĝis koncerto de la juna kataluna grupo Indubio. Okazis ankaŭ 3-hora elektronika diskejo de Gabriele Esposito Guido.

Ankaŭ okazis "Kataluna kultura horo" kun tradiciaj katalunaĵoj kiel homturoj. Post la kongreso, oni organizis ekskursojn al Barcelono.

Okazis komuna vidado de la eklipso. En la zono kie okazis la IJK la eklipson oni povis vidi komplete, do estis granda spektaklo vidi la sunan eklipson amase kaj en gaja etoso.











ŜAKO

La peono, la animo de la ŝakludo



Kiam ni pensas pri ŝako, nia menso iras rekte al grandaj manovroj de la damo, aŭ elegantaj movoj de kurieroj kaj ĉevaloj. Tamen, la grandaj majstroj ne dubas aserti, ke la peonoj estas la animo de ĉi tiu ludo. La monda ĉampiono François Philidor diris, ke *la peonoj estas la animo de la ŝako*.

Por kompreni la peonojn, ni devas komenci per ilia baza moviĝo. Malkiel la aliaj pecoj, la peonoj antaŭeniras kaj neniam povas malantaŭeniri. En sia unua movo, ĉiu peono havas la eblecon fari unu paŝon aŭ salti du kvadratetoj. Inter komencantoj ekzistas la erara penso, ke oni povas fari unu paŝon, sed movi du peonojn sam-foje. Ĉi tio estas tute kontraŭnorma.



En sia unua movo, peono povas antaŭeniri unu ĉelon.



Aŭ du ĉelojn.




Sed NENIAM, antaŭeniri du peonojn sam-tempe.

Peonoj neniam povas salti super iu ajn peco, ĉu amika, ĉu rivala. Se la antaŭa kvadrato estas okupata, peono estas blokita kaj ĝi ne povas antaŭeniri, eĉ se temas pri la unua moviĝo.

Kvankam la peono antaŭeniras rekte, kiam ili kaptas alian pecon, tion ili faras strikte diagonale. Tio estas, okaze de kapto ĝi antaŭeniras unu ĉelon maldekstren aŭ dekstren. Unu el la reguloj kiuj pleje konfuzas tiujn, kiuj eniras en ĉi tiun belan ludon, estas la **“Preterpasa preno”**. Ĉi tiu regulo aplikiĝas, kiam peono moviĝas du ĉelojn antaŭen el sia komenca pozicio, kaj kontraŭa peono povus preni ĝin, se la unua peono farus unuĉelan paŝon anstataŭ duĉelan. La regulo ebligas al la kontraŭa peono preni la ĵus paŝintan peonon, kvazaŭ ĝi movis nur unu ĉelon antaŭen.





La blanka peono moviĝas du ĉelojn antaŭe. La nigra peono povas kapti la blankan peonon kaj okupi ĝian lokon. Tamen, ĉi tiu kapto povas okazi nur tuj poste al la movo de la kaptebla peono.

Verŝajne, la plej grava kaj decida momento en la vivo de peono estas ĝia grimpo ĝis la okan vicon, tio estas, la fina linio en ĝia vojo. Kiam peono sukcesas trapasi la tutan tabulon kaj ĝi atingas la lastan vicon, okazas la tiel nomata "promocio aŭ kronigo". En ĉi tiu ĝusta momento, la peono transformiĝas kaj devas esti ŝanĝita nepre per alia peco de la sama koloro, tio estas, ĝi fariĝas damo, turo, kuriero aŭ ĉevalo, kompreneble ne povas transformiĝi en alian peonon aŭ en reĝon.





La blanka peono atingis la lastan vicon en sia vojo. Tiam li transformiĝas en alian samkoloran pecon, ĉi-kaze en damon.

Ene de la ŝakluda mondo ĉi tiu ŝanĝo estas konata kiel "promocio", tio estas, kiam la peono transformiĝas en damon. Tio okazas ofte pro la fakto, ke la damo estas la plej potenca peco sur la ŝakluda tabulo. Tamen, kiu ajn samkolora peco povas esti elektata, pro tio se la ŝanĝo estas "peono kontraŭ turo, kuriero aŭ ĉevalo", ĝi estas konata kiel "subpromocio".

Nova libro en esperanto, baldaŭ eldonota en Andaluzio



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo planas eldoni, tre baldaŭ, novan libron. La nova verko temos pri andaluzia kuirarto, tiel ni plenumas unu el la celoj de la asocio: disvastigi la andaluzian kulturon pere de la internacia lingvo.

Venont-numere ni informos pri kiamaniere oni povas aĉeti ĝin kaj pri la prezo.

Esperanto, ponto inter popoloj



Ponto Olivargas en Almonaster la Real (Onubo)

Skolta Mondo

Ekzempo de Skolta Frateca Kodo

La skolta frateca kodo baziĝas sur la skoltaj leĝo kaj promeso. Ĝia fundamenta principo estas konsideri ĉiun skolton kiel fraton, sendepende de nacieco, raso, lingvo aŭ grupo en konflikto. Ĝi promocias solidarecon, pacon kaj senkondiĉan helpon al apudulo en ajna cirkonstanco. Ĉi tiu kodo funkcias kiel ne-frakasebla morala kompaso, kiu troviĝas super kiu ajn diferenco kaj eĉ super militoj.

Ĉi tiu kodo realiĝis dum la lastaj tagoj de la Dua Mond-Milito sur insulo en la Pacifika Oceano, temis pri la kortuŝa historio de *"La nekonata japana skolto-soldato"*.



Kiel dirite, dum la lastaj tagoj de tiu terura milito, en insulo kie luktis la japana kaj la usona armeoj, juna usona mar-infanteriano estis grave vundita dum kombato. Li restis apartigita de sia brigado senkonscie. Kiam li vekiĝis, li rimarkis, ke li estis tute sola kaj certe ĉirkaŭigita de japanaj soldatoj. Subite, japana soldato aperis antaŭ li, kun sia fusilo kun bajoneto.

Sciante, ke li tuj mortus, la usona soldato movis reflekse sian manon por kovri sin, samtempe li faris, kun siaj fingroj, la skoltan saluton. La japana soldato tiam, subite, haltiĝis. Li ankaŭ estis skolto en sia junaĝo. Li rekonis la universalan skoltan saluton, kaj li memoris, ke skoltoj estas fratoj en la tuta mondo. Krome, certe gvidata de la principoj de la samuraja kodo, li konsideris, ke vundita kaj senmova malamiko jam ne estas batalanto kaj oni ne devas lin mortigi.

Anstataŭ mortigi lin, la japana soldato bandaĝis lian vundon kiel eble plej lerte, li lasis noton kaj li foriris. Baldaŭ poste, la usona mar-infanteriano estis savita de siaj kamaradoj. En la hospitalo li trovis la noton, skribitan en la japana lingvo. Li petis al apudulo tradukon. La teksto diris:

«Mi estas japana soldato, kiu ĵus vidis vian tri-fingran saluton, kaj mi memoris, ke ankaŭ mi estis skolto. Por mi estus tute ne-pardonebla mortigi vunditan soldaton kaj skoltan fraton. Skoltoj estas fratoj, mi helpis vin per unua flegado. Bonŝancon.»



Post la milito la usona soldato revenis en Japanion, li celis trovi la japanan soldaton. Sed li ne sukcesis. Verŝajne li mortis dum la batalo. Kelkajn jarojn poste, post la diskonigado de ĉi tiu historio, oni starigis memoran monumenton en *Kodomo No Kuni* (Monda Parko de la Infanoj), proksime al Jokohamo en Japanio, kiel eterna omaĝo al tiu ne-konata skolto, kiu neniam forgesis sian promeson pri frateco.



Andaluzia Kuirarto

Pestinjoj

La origino de la pestinjo datiĝas en la Al-andalusa epoko, kun influoj de la nordafrikaj dolĉaĵoj kiel la *ŝebbakja*. Dum postaj jarcentoj, la recepto estis adaptita de la kristanaj monaĥinejoj. La unua literatura referenco aperas en la 16-a jarcento en la verko *La Lozana Andaluza* (1528), tio konfirmas, ke tiutempe ĝi jam estis klasikaĵo en la popola kulturo.

La pestinjoj estas kutima frandaĵo dum elstaraj festoj en Andaluzio, kiel Sankta Semajno kaj Kristnasko. Festoj kie la familioj renkontiĝas kaj receptoj trapasas generaciojn.



Jen la ingrediencoj

- Faruno.
- Oliv-oleo
- Sukero.
- Mielo.
- Citron-ŝelo.
- Aniz-semoj.
- Blanka vino.

Jen la elaborado:

1) Enen de pato kun olivoleo metu kelkajn citron-ŝelojn, la celo estas aromigi la kuiraĵon. Kiam la ŝeloj jam estas orumitaj, estingu la fajron en la kuirilo. La olivoleo devas malvarmiĝi.



Bonan Apetiton !

2) Enen de granda bovlo metu farunon, sukeron, aniz-semojn, iomete da olivoleo kaj blankan vinon. Knadu ĉion bone, ĝis la atingo de pasto. Se necese, aspergu iomete da olivoleo sur la bovlon, por eviti la adheron de la pasto al la ujo. Post la konstanta knado, metu teler-tukon sur la bovlon dum duonhoro.



3) Per rulo platigu la paston. Poste tranĉu la pastaĵon laŭ strioj, proksimume 4-centimetraj. Poste denove tranĉu ĉiun strion laŭ kvadratoj.



4) Faldu la angulojn de ĉiu kvadrato. Algluu du angulojn de la pastaĵo sur la centra parto, pere de akvo-guto. Ĉi tiuj pastaĵoj devas ripozi almenaŭ dum 30 minutoj antaŭ ol friti ilin.



5) Varmigu denove la oleon aromigitan per citrono. Fritu la pastaĵojn. Post la fritado metu la pestinojn sur sorbantan kuirejan paperon.



Prezentado:

Oni povas fini la ellaboradon de paskaj pestinjoj laŭ du variantoj:

• kun sukero: pulvore disŝutu sukeron sur la fritaĵojn.

• kun mielo: diluu mielon kun kelke da akvo. Verŝu tiun likvaĵon sur la fritaĵojn.



Pestinjoj kun mielo.



Pestinjoj kun sukero.



Alpandeire estas vilaĝo en la Arunda Montaro, malaga provinco. Temas pri tre malgranda urbeto, nur kun 280 enloĝantoj, tamen ene de ĝi troviĝas granda preĝejo starigita honore al Sankta Antono kaj, kvankam la vilaĝo troviĝas tre fore de Egiptio, ene de la preĝejo kaŝiĝas du mumioj.

La preĝejon oni starigis meze de la 16-a jarcento, kaj en la jaro 1713 estis necese restaŭri ĝin. Tiam aperis tiuj du mumioj.

Laŭ rakontoj, la starigo de granda preĝejo en tre malgranda vilaĝo okazis pro eraro. Tiel, laŭ la unua projekto, la konstruo devus okazi en alia pli granda vilaĝo, tamen la sendita arkitekto konfuziĝis. Kompreneble la starigo de granda preĝejo estis tre multekosta entrepreno, do, dum la laboroj la mono elĉerpiĝis. Tiam, geedza paro de Alpendeire proponis sin mem por pagi la konstruon. Laŭdire, tio estis eble, por la ekzisto en ilia hejmo de trogo plena de oraj moneroj. Pro la fakto, ke ĉiutage estis necesa pli kaj pli da mono, kaj ŝajne tiu neniam elĉerpiĝis, aperis dirajo en Alpandeire, kiu asertas, ke *nenio estas pli profunda ol la trogo de la Onklino Florita*, memorante la grandan trogon, el kie la paro, laŭdire, prenis la monerojn.



Dank'al ĉi tiu mono estis eble fini, la *Katedralon de la Arunda Montaro,* tiel nomata pro la fakto, ke temas pri granda preĝejo starigita en tre malgranda vilaĝo. Verŝajne, la mumioj estas la restaĵoj de tiu paro kiu ebligis la konstruon de la preĝejo. Laŭ fakuloj la mumioj estas almenaŭ 300-jaraj, tio koincidas kun la starigo de la monumento kaj tre eble pravigas la legendon de la konstruo.

Nuntempe la mumioj ripozas ene de kripto kun travidebla fenestro, kiu ebligas la rigardon de la restaĵoj. Alia elstarinda mistero temas pri la tekniko uzita por mumiigi la korpojn. Ili estis tre similaj al tiuj de la antikva egipta kulturo, kaj ege malsimila al la rimedoj uzitaj mezepoke en Hispanio.


Do, kvankam Alpandeire estas malgranda vilaĝo, vere la naturaj allogaĵoj ĉirkaŭantaj ĝin kaj la mistero neprigas viziton al ĉi tiu bela loko.

Preĝejo honore al Sankta Antono en Alpandeire (Malago).



Andaluzio

Krucvorto



	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G
1								
2								
3			■		■	■		
4							■	■
5								
6				■				
7						■		
8								


HORIZONTALE

1. Antikva urbo fama pro siaj muregoj, sia zigurato kaj la pendĝardenoj.
2. Fortegaj ventoj.
3. En la aŭtomobiloj de Danio. ■ Finaĵo de akuzativo. ■ ■ Prepozicio montranta apartenecon.
4. Afrika besto kun grandaj kruroj kaj kolo.
5. *(Plurale)* Tiu, kiu pretigas por publikigo la verkon de alia.
6. *(Sen la lasta vokalo)* Maldika kaj malpeza travidebla teksaĵo. ■ *(Sen la lasta vokalo)* Membrano de la stomako de la mamuloj.
7. Estiĝi en iu loko aŭ tempo. ■ Sufikso almetiĝanta al numeraloj kaj uzata por derivi vortojn, indikantajn unu el la egalaj partoj de tuto.
8. *(Inverse kaj plurale)* Naŭ estraranoj, kiuj regadis Atenon.

VERTIKALE

A. *(Plurale)* Detala antaŭkalkulo de la jaraj en- kaj el-spezoj de ŝtato, urbo, entrepreno, asocio ktp.
B. Titolo de membroj de iamaj imperiestraj familioj aŭ de suverenoj.
C. Interjekcio uzata por esprimi iom malŝatan senzorgecon. ■ *(Sen la lasta vokalo)* Ligiteco aŭ interefiko inter du aŭ pluraj aferoj.
Ĉ. *(Inverse)* Oscile moviĝi laŭlonge. ■ *(Inverse)* Videbla sur la aŭtomobiloj de Nov-Zelando.
D. Artikolo. ■ Plantorgano ĝenerale verda, plata kaj maldika, kiu kreskas sur tigo kaj ĝenerale servas por asimili la karbonan dioksidon.
E. Sufikso almetiĝanta al numeraloj kaj uzata por derivi vortojn, indikantajn unu el la egalaj partoj de tuto. ■ Ia nombro da samspecaj objektoj. ■ Simbolo de kilo.
F. *(Sen la lasta vokalo)* Punkto, kie kruciĝas kurboj aŭ vojoj. ■ *(Inverse)* Vesto unupeca, plejofte uzata de virinoj.
G. *(Inverse)* Loko. ■ *(Inverse kaj plurale)* Membro de grupo.

Rebuso



Kiel vi ricevas la revuon?

Ŝaradoj

Ĝi aperas dufoje en momento, unufoje en minuto, sed neniam en cent jaroj. Kio ĝi estas?



Ĝi malfermita,
venteto furiozas.
Poste fermita,
via mano ripozas.
Kio ĝi estas?

SOLVOJ AL LA VORTO-LUDOJ DE LA PASINTA NUMERO

S	E	G	M	E	N	T	O
I	D	E	A	L	O	■	O
B	A	C	I	L	O	J	■
A	M	I	■	A	M	A	S
R	O	L	■	B	A	Ĥ	■
I	■	E	■	O	S	T	O
T	U	D	O	R	■	O	V
O	M	■	D	I	O	N	O

REBUSO:
Oni proponis jenan demandon:
Kio estas celata de kampara ŝtelisto?
Aperis jenaj bildoj:
Nombro 2, ankaŭ nomita BI, ene de la litero O
Sinsekvo de literoj, escepte la litero G, ardantaj.
El kio rezultas: ***BI en O sen G arda.***
Do: ***Bieno sengarda.***

ŜARADOJ

• *Mi rompiĝas, se vi.....* LA SILENTO.

• *Ju pli oni forprenas...* LA TRUO.

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio. Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

La Asociación Andaluza de Esperanto es la organización que tiene como objetivo difundir la lengua internacional esperanto en Andalucía. Se fundó en el año 1984 gracias a la iniciativa de esperantistas de las provincias de Málaga, Sevilla y Córdoba. Hoy pertenecen y colaboran con AEU esperantistas de toda Andalucía y también de fuera de ella.

Estraro	Directiva
Prezidanto / Presidente:	Ángel Arquillos López
Vicepresidente / Vicprezidanto:	Alejandro Burgos Escalante
Sekretario / Secretario:	José Mª Rodríguez Hernández
Kasisto / Cajero:	Carlos Spinola
Voĉdonantoj / Vocales:	Juan Díaz Casado
	Alejandro Pinos Cabello
	Yousef Hamdi el Farouki

Poŝta adreso / Dirección Postal: C/ Ánfora 6 5º D 29013 Málaga (Hispanio)
TTT-paĝo / Página web: www.esperanto.ac
Tvitero / Twitter: @AndaluzioEO

Aliaj adresoj de la E-movado / Otras direcciones del movimiento esperantista:

Federación Española de Esperanto: www.esperanto.es
Asociación Universal de Esperanto: www.uea.org


MALAGO, 9-13a de oktobro 2026
VERDA LINGVO
POR VERDA NATURO
Esperanto por daŭripova mondo
4a
NaturAmika
KuturSemajno
en Esperanto
ESPERANTA
NATURAMIKARO
aeu
Andaluzia Esperanto - Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto
22a Andaluzia
Kongreso de
Esperanto
Kiam la naturo parolas,
ni elektas komunan lingvon.
Inter la rokoj kaj akvo de El Caminito del Rey.
ni memoras ke la Tero ne bezonas multajn lingvojn –
nur unu kiu respektas, kunigas kaj protektas.
Aliĝu!
https://kulturservo.esperanto.net/evento/
nakseake-2026
Esperanto – vojo inter homoj kaj naturo